

# ESPERANTISTO

## ESPERANTYSTA POLSKI

ELDONANTO WYDAWCA POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO

REDAKTANTOJ PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI  
REDAKTORZY

### \* 1867 JÓZEF PIŁSUDSKI † 1935

„La ideo, kiun homo ekamegis, estas mezurilo de lia grandeco“ — diris en XVIII jrc. nia granda patrioto kaj verkisto, Stanisław Staszic.

\* \* \*

La 12-an de majo terura sciigo ekkuris en la mondon, komence vekante nekredemon, poste doktoron, alitande ankaŭ kompaton: Marŝalo Józef Piłsudski ne vivas...! Ektarmis okuloj, hirtigis pro timo haroj, serioziĝis vizaĝoj.. Jurnalokaj radiodisvastigadista funebrajn sciigojn.. La bedaŭro kaj doloro estis ĝenerata kaj sin-



raj kompatesprimoj. Oni bone sciis, ke foriris por ĉiam Granda Homo, Forgisto de gravaj historiaj okazoj.

\* \* \*

Flama amo al Patrujo, pasia dezirego al interŝtata kaj tuthomara paco, absoluta neprofitemo, oferego por publikaj celoj, amo al infanoj, eksterordinara laboremo kaj refoje granda amo al Patrujo - estis karakterizaj ecoj de l'mortinta Marŝalo, Liaj plej amataj ideoj.

Ĉu ekzistas pli sublimaj,

Setkfoje la terura novaĵo kaŭzis subitan morton de l'ekscitintoj. Intenaj ploris sinulte

pli altaj ideoj, ol altruisma laborego por la nacio, paco kaj homaro?

La ideo, kiun homo ekamegis



## LIA LASTA VOJO

Nur malofte okazas, ke la historio de iu popolo estas tiel kunkreskinta kun unu homo, kiel la historio de la pola popolo estas kunkreskinta kun la Marŝalo Piłsudski. En la epoko, kiam la pola popolo ne plu kredis, ke per insurekcio oni sukcesos revivigi la perditan sendependon, kiam la popolo opiniis ĉiun perforton kontraŭ la okupintoj de Polujo, kiel nura romantikismo, kondamnita al malvenko — tiam ĝuste aperis Józef Piłsudski, kiu vidis unu solan vojon al libereco — la batalon. Piłsudski ne imagis akiri alie la liberecon de Polujo ol per glavo kaj batalo. Kaj tiel li ĝin akiris....

Oni opiniis ilin frenezuloj — Piłsudskin kun kelkmilo da junaj fervoruloj, kiam ili preparis batalon kontraŭ la okupintoj de Polujo. La batalo okazis, per batalo venkis Piłsudski. Li venkis ĉiam. — Lia ĉiu batalo finiĝis triumfe. Lia plej granda triumfo estis la libereco de Polujo. Li venkis ĉiam, — ĉiu batalo donis al li novan triumfon.

Nur nun li malvenkis... Lia unua kaj lasta batalo... Li batalis kontraŭ la morto, kontraŭ tiu nevidebla forto, kiu venkis la grandan Napoleonon kaj aliajn triumfantulojn... Li malvenkis kaj devis forlasi la batalkampon. Sed ne kiel venkito li foriris. — Lia lasta vojo estis triumfa marŝo, kondukanta lin en la vicon de la polaj reĝoj kaj naciaj herooj, en la subterejoj de la kastelo Wawel en Kraków, kie ripozas reĝo Sobieski, reĝo Batory, reĝo Vladislao Jagiełło, Tadeo Kościuszko, Julio Słowacki, Adam Mickiewicz, — kaj ne multaj aliaj. Tie ripozas la eternan ripozon ankaŭ la Marŝalo Józef Piłsudski.

\* \* \*

La pola ĉefurbo Warszawa, prezentis priplorindan vidon. La ŝtat-flagoj en nigra krepo pendis mallevitaj, la montro-fenestroj, la fenestroj kaj la balkonoj estis dekoritaj per portretoj de la mortinto, nigre envolvitaj.

Ĉiuj amuzoj, distroj kaj ludoj ĉesis. Dum la tuta semajno, la radio-laŭtparoliloj disaŭdigis funebrajn komunikojn. Por tuta tag-nokto estis la ĉerko kun la mortinto starigita en la katedralo kaj alirebla por la publiko.

Pli ol tricent mil personoj trairis la katedralon, por la lastan fojon rigardi Tiun, kiu estis kvazaŭ legendo en la historio de la pola popolo. Liaŭ la de-

ziroj de la Marŝalo, esprimitaj en la testamenton, Lia cerbo estos donita al la Cerbo-Instituto, por sciencaj celoj, la koron oni enterigos en Wilno, en la tombejo de Lia patrino — kaj la korpo balsamita ekripozos en arĝenta ĉerko en la reĝa kastelo Wawel, en Kraków.

La funebra eksportado de Warszawa al Kraków okazis hodiaŭ (17. V. 35.). La urbo vestiĝis funebre. La preĝejo-sonoriloj sonoris senĉese. En la stratanguloj radio-laŭtparoliloj informis pri iro de la funebra procesio.

Impona triumfo-marŝo de la Marŝalo Piłsudski. Reprezentantoj de la tuta mondo (eble kun malgrandaj esceptoj), en oficialaj uniformoj, sekvis la ĉerkon al la Mokotova Kampo, kie okazis la lasta manifestacio de la pola Armeo, antaŭ ĝia Kreinto kaj Estro. En morta silento paŝis reprezentantoj de ĉiuj formacioj de la pola militistaro antaŭ la ĉerko de Marŝalo Piłsudski, por la lastan fojon adiaŭi Tiun, kies ordonoj estis por ili sanktaj. Sur granda pafilego li ripozis, akceptante defiladon de la armeo, en ĉesto de duona miliono da homoj, kiuj tie ĉi kolektiĝis, por la lastan fojon vidi Lin...

Tambureloj ekmurmuris. — pafilegoj ektondris, — 101 pafoj ekknaris, distranĉante la silenton, kiam la generaloj sur siaj ŝultroj transportis la ĉerkon kun la Marŝalo al pafilego, starigita sur vagono, per kiu li faris sian lastan vojon, por atingi la eternan ripozejon en la reĝa kastelo, inter la polaj reĝoj kaj naciaj herooj — la historia kastelo Wawel.

Tie, post la lasta marŝo triumfa, apud Sobieski, Batory kaj Kościuszko, por eterne ripozas la reviviginto de Polujo — Marŝalo JÓZEF PIŁSUDSKI.

---

Krom la ĉefartikolo kaj la artikolo sekva lin, ni publikigas en la nunmonata n-ro de P.E. du pluajn artikolojn, koncernantajn la Marŝalon, kiuj estis ĝis tiam disaŭditaj kiel prelegoj pere de polaj radios'acioj. La artikolo de Z. Zawisanka estis publikigita pasintjare, kiam la Marŝalo ankoraŭ vivis, tiu de Prof. dro O. Buiwid publikigis post la morto de la Marŝalo. Ili estas kompostitaj alimaniere, ol la aliaj, ĉar ni intencas ilin aperigi en aparta broŝuro, enhavanta la plej valorajn Esp.-radio-prelegojn.

---



## VII. POLLANDA KONGRESO DE ESPERANTO.

KRAKÓW, 29—30 DE JUNIO 1935.

W dniach 29 i 30 czerwca b.r. odbędzie się w Krakowie ogólnopolski kongres esperantystów. Zawiązany komitet składa się z przedstawicieli obu najważniejszych związków esperantystów krakowskich z pp. Prof. Odonem Bujwidem i Dyr. Eugenjuszem Torem naczele.

Komitet kongresowy poczynił odpowiednie starania o uzyskanie dla przyjezdnych szczególnych udogodnień w związku z przejazdami kolejowymi oraz pobytem w Krakowie. W programie kongresu jest m. in. Wieczór Włoski z okazji wszechświatowego kongresu esperantystów, który odbędzie się, jak wiadomo, w bieżącym roku w Rzymie, dalej zwiedzanie miasta, w szczególności zwiedzanie katedry na Wawelu z kryptą Józefa Piłsudskiego i sypanie kopca Piłsudskiego na Sowińcu.

Wedle obliczeń komitetu kongres tegoroczny będzie szczególnie licznie obsesłany przez grupy miejscowe całej Rzeczypospolitej. Zgłoszenia na kongres przyjmuje sekretariat w Krakowie, ul. Lubicz 34.

Karaj gesamideanoj, la cititan raporton pollingvan, tute malongan. ni prezentas al vi, por ke vi klopodu enpresigi ĝin en via loka gazetaro. La afero estas tre grava, por ke nia ĉi-jara kongresu havu grandan partoprenantaron. Cetero, vi povas plilarĝigi la kadrojn de la raporto per tio, kio nun sekvas en Esperanto:

### Kongresa Komitato.

Prof. Dr. Odo Bujwid — prez., Dir. inĝ. E. Tor kaj Dir. inĝ. E. Kostecki — v-prez., Ludwik Kutscher — sek., Józef Alfus — kasisisto, Adv. Dr. Leopold Dreher kaj Tad. Hodakowski — komitatanoj.

Gvid. de sekcioj: Propagando: Dro L. Dreher. Loĝado: Karol Ordyński. Diversaĵoj: Julia Neuberg.

Car la t.n. Krakovaj Tagoj, pri kiuj ni raportis en nia maja numero, ne okazos, la kongresa komitato estis devigita ŝanĝi iom la programon. Ĝi do prezentiĝas jene:

**Vendredo 28. VI.** Akceptado de la alveturintoj en la stacidomo Krakova.

9 h. vesp. Interkoniĝa Vespero.

**Sabato 29. VI.** 9 h. diservo.

11 „ inaŭguro de la kongreso.

13 „ komuna tagmanĝo.

15 „ malfermo de la konferenco de PED.

20 „ Itala Vespero.

**Dimanĉo 30. VI.** 8 h. Ekzamenoj de PED. kaj urbovizitado.

10 „ laborkunsido de PED.

13 „ komuna tagmanĝo.

15 „ laborkunsido de PED.

17 „ fermo de la kongreso.

Nun estu konataj la detaloj de la „programeroj“, prezentataj kronologie:

Por ke niaj ŝategataj gastoj diverslokaĵ ne eraru serĉi sian hotelon, post alveno en la urbon, nia vigla samideanaro zorgos,

ke jam en la stacidomo vendrede la alveturintoj havigu al si siajn dokumentojn kaj ĉiajn informojn. Ekz. la deĵorantoj diros al vi, kie vi trovos samvespere la samideanojn.

Vi trovos ilin komforte manĝantaj sian vespermanĝeton en „Zakopianka“, ĝardenrestoracieto (en la laŭbo) tute proksime al la stacidomo, kaj interrakontantaj siajn kongresajn impresojn, sub la gvidado de nia poetino-samideana frl. Irena Szczepańska. Ŝi ja preparas al vi (jam antaŭ ol la kongreso estos malfermita morgaŭe) kongres... karikaturojn. Ŝi estas tre prava: post fermo de la kongreso ĉiuj vi tre versaĵne rapidegos rehejmigi vin. Do, karaj, preparu ankaŭ vi mem tiom da sprito kontraŭ ŝi kiom ŝi preparas — kontraŭ vi...

Sabate okazos, kiel vi legis, **Itala Vespero**. Do mi volas malkaŝi al vi la sekreton, ke tiu ĉi speciala, altartista Vespero ne estas senpaga. Sed se vi pagis en ordo vian kongresan kotizon, vi ricevos liberan eniron al la Vespero, kiu okazos sub la alta protekto de diversaj konsuloj kaj ambasadoroj, inter kiuj la itala antaŭ ĉiuj, ĉar ja ne tre fora estas la tempo, kiam ni kongresos en Roma. La Vesperon aranĝas eminentaj kant- kaj muzikartistoj ne nur krakovaj sed ankaŭ lvovaj kaj aliaj. Vi aŭdos ne nur itale, sed ankaŭ esperante, kelkajn belajn kantojn, tiel formante kvazaŭ konkurson pri belsoneco de ambaŭ lingvoj...

Por la ekzamenoj estas tempo prepari sin ankoraŭ nun: Esperanto estas ja tiel ege facila...

Okazos du kategorioj de ekzamenoj: tiu pri sciado de la lingvo, por kursfinintoj. Ili devas scii korekte paroli kaj skribi senerare, kompreni iom pri nia „komplika“ gramatiko, sed ne bezonas koni la literaturon kaj la teorion de la Lingvo Internacia. Tion ĵus cititan kaj multe da aliaj aferoj, ekz. la didaktikon de Esperanto devas koni nur kandidatoj je la alia ekzameno, tiu por kugvidantoj. La ekzamenon aranĝas Pollanda Esperanto-Instituto. Kiel ekzamenantoj „ĉesidos“ (ne: ĉes-idos) membroj de la Lingva Komitato. (Nun vi jam scias, al kiuturni vin pri „protekto“...).

Por tiuj, kiuj jam ekzameniĝis, aŭ ne ankoraŭ estas pretaj... la kongresa komitato aranĝas sabate antaŭtagmeze fakan gvidadon tra la urbo.

**Loĝejoj:** Nia specialisto pri loĝejoj, s-o Ordyński zorgas, ke la gastoj ĝuos jenon: hotelĉambro 1-lita — 3.90, 2-lita — 7.50 zł. Servado kaj trinkmono enkalkulitaj.

Privataj ĉambroj 2-litaj — 4 zł. aŭ 6 zł. laŭ elekto.

Komunaj litĉambroj (en Dom Kolejarzy, str. Warszawska) po zł. 1.05 aŭ 90 gr. laŭ elekto.

Ni atentigas, ke nur nemultaj ĉambroj privataj estos disponeblaj por 4 resp. 6 zł. (por du personoj), sekve kiuj deziras tiajn, bonvolu mendi ilin (kaj pagi samtempe) kiel eble plej frue. Vidu la aliĝilon.

**Manĝado.** Nia „manĝestrino“ s-ino Neuberg zorgas, ke vi povas partopreni en komuna tagmanĝo por la sumeto de 1 zł. Tio e-



stas vere alloga, ĉu ne? Kompreneble, se vi deziras pli ol 3 diversajn manĝaĵojn, vi povas, kial ne?

**Fervojaj biletoj.** Pro la festo de ŝutado de tombomonteto de marŝalo Piłsudski al Kraków ĉiu povas entrepreni tre malkaran, rabatitan vojaĝon. Legu pri tio en la gazetaro. La Kongresa Komitato, sendepende de tio, zorgas ĉe la Ministerio de Komunikado pri specialaj rabatoj por niaj samideanoj. Vi legos pri tio ĝustatempe en speciala cirkulero, dissendota al esperantaj grupoj kaj al tiuj, kiuj jam aliĝis al la kongreso. Memoru, ke aliĝi tio estas pagi la kotizon 4 zł. por familianoj kaj studentoj 2 zł, por senlaboruloj (sur bazo de oficiala legitimilo) senpage. Konto PKO. 411.404.

**Afiŝo propaganda.** La K.K. dissendos al la esp. grupoj kaj al dezirantoj specialan propagandan afiŝon. Nome, el la materialoj de la Universala Kongreso de 1931 restis ankoraŭ stoko da 150 afiŝoj, kiuj estas nun speciale aranĝataj por servi al la celoj de VII. Pollanda. La afiŝo estas belega, multkolora kaj bonvolu pendigi ĝin en videblaj lokoj ekz. en via stacidomo. petante la permeson de la koncerna estro, kiu certe ne rifuzos akcepti tiun veran ornamon. majstraĵon de la desegna kaj presa artoj.

Kaj nun, karaĵ. ni atendas vin plej kore!

Ni ĝojos ankaŭ akcepti kun nia tradicia gastameco eksterlandajn samideanojn, kiuj deziras pasigi kelkajn tagojn en **Kraków, la urbo de esperantaj kongresoj.**

Ek' do al la urbo de esperantaj kongresoj, al Kraków.

Kraków vin atendas.

Kraków vin atendas. Neniu esperantisto restu for!

**La Kongresa Komitato.**

**JÓZEF ORZECH.**

## PRI KAŜUBA LANDO, LINGVO KAJ VERKISTOJ.

La nordokcidenta parto de Pomeranio estas loĝata de gento parolanta idiomon kaŝuban.

La regiono okupata de Kaŝuboj etendas sir de Chojnice norden al distrikto laŭenburga (en germana Pomeranio), suden al la rivero Brda, de ĝi norden kontraŭ Kościerzyna, Oliwa, Gdańsk (Danzig) kaj pola marbordo. Ĉefa kaŝuba rivero estas granda Radunia (germane: Radaune), kiu trafluante kelkajn pentridaŭrajn lagojn fleksiĝas sub Kartuzy al Gdańsk kaj enfluas sur ĝia teritorio en riveron Mottawa (germ.: Mottlau). fine kun ĝi en Wisła'n (Vistulon) kaj en la maron.

La centroj de kaŝuba vivo kaj movado troviĝas en Kościerzyna, Kartuzy, Wejherowo, Chojnice. Antaŭ la milito oni kalkulis ĉirkaŭ 180.000 da Kaŝuboj.

La kaŝuba dialekto similas multege la polan lingvon: se oni estas antaŭ-informita pri la foretikaj ŝanĝoj, koncernan-

taj ĉefe la elparolon de vokaloj kaj konsonantaj firiĝoj, oni povas tuj la kaŝuban paroladon aŭ skribaĵon kompreni — sen lerno de ia kaŝuba gramatiko, ĉar la lingva konstruo enhavas la samajn formojn, kiel la pola lingvo. Kompreneble estas ankaŭ sentebla la influo de lingvo germana, kiun la Kaŝuboj estis antaŭe devigitaj paroli en lernejo, oficejo, dum militservado kaj laboro ĉe germana dunganto kaj ĝia ofta uzado surstampis sian postsignon en fleksio kaj kelkaj esprimoj.

La historio de Kaŝuboj estas tiu de Pomeranio (pole: Pomorze, kio signifas landon „ĝis la maro“).

En la intelektla vivo partoprenis la Kaŝuboj apenaŭ en la dua duono de XIX jarcento. Florjar: Cejnowa kaj Hieronim Derdowski estas la plej gravaj kaŝubaj verkistoj, sed la plej grandan aplaudon elvokis la trankvilaj, bonhumoraj vortbildoj de Derdowski, spegulantaj la ka-

ŝuban vivmanieron, ĝojojn kaj malĝojojn, la prapatrajn kulimojn, ecojn de karaktero ktp.

Plej grandan dankon ne nur de Kaŝuboj, sed ankaŭ de Poloj meritis Derdowski pro sia kaŝuba epopeo „Pri Moŝt' Ĉorlinski kiu al Puck pro retoj vojaĝis". Li donis tie en kaŝuba lingvo riman rakonton en tri libroj, kies centra persono estas nobelo Ĉorlinski el Chmielno apud Kartuzy kun liaj vojaĝado kaj aventuroj tra la kaŝuba lando ĝis Hela duoninsulo. (La romo Czarliński apartenas al meritplenaj familioj en Pomorze kaj Grandpolujo).

La sincereco de sentataj impresoj, simpleco de la popolo, vera religieco, ia sentemo por Polujo, belaj priskriboj de la naturo, lando, ĉielo, jarsezonoj, homaj okupoj, ĉio priŝtita de bonhumoreco, faras trar kviligan impreson kaj forpelas el la menso ĉiujn zorgojn; la leganto estante preskaŭ partoprenanto de prikantataj aferoj ĝojas ĉiam, se la heroo akompanata de sukceso venkas ĉiujn malhel-

pojn kaj tuta epopeo disvolviĝas el si mem neeldeviĝite, tute nature, sen artifikaj rimedoj.

Derdowski (naskita en 1852 j) serĉante ĝustan por sia talento kaj emo postenon vizitis Toruń, Warszawa'n Petersburgon, Lvovon, Krakovon, elmigris poste el Amerikon, kie li redaktis la polan gazeton: „Wiarius" („Militbravulo") kaj mortis en la j. 1902. Krom „Ĉorlinski" postlasis Derdowski belar epizodon pri „Kaŝuboj ĉe Vieno" el la tempoj de viena sieĝo kaj venko de reĝo Sobieski.

Nune estas farataj penoj por reheimigi liajn tombrestaĵojn el Ameriko kaj konstrui al la granda Kaŝubo indan tombon kun monumento apud la maro en vilaĝo Wielka Wieś.

Hodiaŭ la kaŝuba movado ne havas videblan gvidarton, influhavan sur la tuta teritorio de kaŝuba lando. Vekiĝas laŭmen la movado de „Junaj Kaŝuboj", la poetoj kaj agantoj A. Majkowski, B. Trepczyk provizas per siaj versaĵoj kaj artikoloj la kaŝubajn jurtaĵojn.

## VOĈOJ EL ALILANDO POST MORTO DE NIA MARŜALO.

La ne atendita morto de la Marŝalo elvokis alilande sinceran kunsenton por ni. Polaj samideanoj ricevis multajn kompatessprimojn de fremdlandanoj. Ankaŭ Redakcio de P.E. ricevis tiujn, kortuŝajn pro ilia sincereco kaj kompreno de nia granda perdo. Ĉar ili estis direktitaj al la pola Esperantistaro, ni presigis ilin ĉi-sube, plej kore dankante al la estimataj aŭtoroj pro ilia bonkoreco.

Sendube la aŭtoroj estas konataj al la pola Esp-istaro: S-ro J. Mátýás aperigis siatempe en P.E. tre interesajn vojaĝpriskribojn el Pollando, s-ro C. Walter estas konata kiel verkinto de „Gajaj vesperoj", „Gajaj horoj por Esp-istoj" kaj „Gaja lernolibro", kies dua eldono jam aperis kaj la Redakcio preparas ĝian recenzon por la plej proksima n-ro.

Karaj Polaj Fratoj!

En via granda doloro pro la ega perdo je la morto de Marŝalo József Piłsudski, ni, hungaroj, ankore funebras kun vi. Eminentulo, kiu servis sian patrujon tiel brave, saĝe, ĝenie kaj sindone, meritis plene la respekton kaj amon ne nur de siaj samlandanoj, sed tiujn ankaŭ de la tuta homaro. Tial sentas ankaŭ ni, hungaroj, sinceran malĝojon pro la morto de via eternamemora eminentulo.

Akceptu la fratan kondolencon de la hungaraj esperantistoj kaj de ĉiuj hun-

garoj, kiujn ligas speciale intensa simpatio al la nun funebre-afliktita polaro! Debrecen, (Magyarország) 14. V. 1935.

József Mátýás

redaktoro de la „NOVA TURAN".

Berlin, 16. V. 1935.

Tre estimata S-ano!

Mi elkore kondolencas vin kaj ĉiujn polojn ĉu esperantistojn, ĉu ne, pro la morto de via Piłsudski, de via grandioza heroo. Ĝus mi aŭdis la funebran solenon de la germana radio. Oni memorigis pri detaloj de liaj grandiozaj agoj por lia patrujo. Estis homo, kiu estas donacita al popolo nur unufoje dum centlo da jaroj. Vi funebras pri li, sed kun vi milionoj da homoj de aliaj nacioj, ĉar lia karaktero estis superhoma. Se li ankoraŭ estus vivanta la zorgo pri la estonteco estus pli malgranda, ĉar liaj spiritaĵoj okuloj vidis klare en la estontecan kaj li sciis venki ĉion.

Via C. Walter.

Estas menciinde, ke tiuj ĉi vortoj estas skribitaj sur originala Esp.-p-karto, prezentanta stelriĉan ĉielon, sur kiu estas videblaj la tero, luno kaj E-stelo. Sub la bildo estas presitaj la vortoj: „Super la tero ŝvebas paca stelo" — ĉe ili la aŭtoro skribis mane: „Ĉu ankaŭ sen Piłsudski?".



privata vivo de tiu hejmo estas mirige modesta. La mono ne gluiĝas al la Marŝalo, ĉar li ĝin nenian ŝatis, sindomite al tutege senprolita servo por la publika bono.

Ĝis malfrua nokto kelkfoje dauras interkonsiliĝadoj en Belvedero, alvenas aŭtomobiloj de ministroj kaj diplomatoj de fremdaj ŝtatoj, kaj se eĉ iufoje venis trankvila tempo, en la fenestroj de kabineto de l' Marŝalo ĉiam flamas soleca lumo ĝis 3-a aŭ 4-a horo matene.

Kelkajn fojojn ĉiujare li vizitas sian naskiĝlokon Vilno, ĉiam proksiman al lia koro, konservante vigan kontakton kun loĝanta tie fratino kaj malpli aĝaj fratoj. Sed la plej agrabla estas al li la malofa ripoztempo en proksima, propra bieneto Pikiliski — apud lago, inter arbarumitaj montoj, simile kiel iam situis la neforgesebla hejmo en lia infaneco.

Tie la tuta familio sentas sin plej bone, fore de homoj, en milda, saniga kunvivado kun la naturo. Post ŝtataj zorgoj oni plej bone ripozas, zorgante, kie oni devas iun arbuson planti, aŭ marki piedirejon. Piŝudski ne havas instinktojn de mastro-kulturisto, tamen, malgraŭ tio li sentas sin plej bone sur sia peco da tero. Kaj eĉ tie la lampo flagras kelkfoje ĝis tagiĝo!...

Kelkfoje scipovas la Marŝalo babiladi longe kaj intime en amika rondo, scipovas ĉarmi per gracio de siaj rakontoj alilandanojn kaj kontraŭulojn. Sed aĝigante li fariĝas ĉiam pli ermito: lia tempo estas tro valora kaj oni devas ŝpari la fortojn. Incitite per malkonkordo aŭ per senkonsileco de l' samlandanoj, kelkfoje li jektas vorton akran, amaran — kaj fermiĝas en si, por trankvile laboradi por ilia bono, komprenata kiel servo al la plej altaj idealoj de l' homaro.

Sur teraso de Belvedero promenas kelkfoje alta, iom ĝibohava vira persono en blua, sen distingiloj, soldata uniformo. El sub ronda ĉapo de unuaj legianoj eliĝas haroj, jam tute blankaj — grizaj lipharoj pendas, kovrante la buŝon. Petremaj, ŝtalaj okuloj sub abundaj brovoj, ĉiam mildiĝas, kiam ili renkontis fidajn okulojn de infano — ĉar tiu teraso estas uzata kiel infanĝardeneto por oficiraj infanoj. La Marŝalo senteme karesas la belajn kaj brunajn kapetojn, sed tuj li flankeniĝas en senhoman aleon, por ne distri sian pensadon.

De infanaĝo li ŝatis mediti, promenante. La plej gravaj decidoj de la pola ŝtato maturiĝas dum tiu malrapida promenado de la blua persono, flagranta, kiel peco da ĉielo, inter floro-komboj kaj arbokedoj!...

## Pri Marŝalo Józef Piŝudski,

Granda viro de hodiaŭa Polujo, Marŝalo Józef Piŝudski, ne unufoje en siaj skribaĵoj kaj paroladoj citis la moralajn fortojn, kiel ĉefan motoron de l' historio. Lia tuta vivo estas potenca ekzemplo pri tio — la vivo, konsiderata ĉiuflanke, ne nur kiel sensuka registro de faktoj. Ni provu elkapti inter ili vivan vizaĝon de homo!...

Iam, en jaroj 1870—80, en bonstata grandbiena domo pola en Litovujo, bolis ĉiutage mastruma laboro kaj gaja babilado de nombra infanaro — kaj ja ie pli profunde sangis la ne cikatrigitanta vundo: la memoro de antaŭnelonga malvenko de ribelo (ne, mi ne ŝatas tiun vorton, ĉar ĝi havas alian sentan signifon)... malvenko de insurekcio en 1863 j., la teruro de senkompataj persekutadoj fare de l' malamiko, la zorgo pri nacia estonteco.

Dum kvietaj vesperoj la patrino kunigadis la pli aĝajn infanojn, por legadi al ili en granda sekreto la flamanj verkojn de polaj poetoj!... Kvazaŭ ŝi donadus trinki el kassita, malpermesita fonto. Tiu knabeto, kaŭranta ĉe siaj genuoj, alrigardanta senmove ŝian inspirplenan vizaĝon, kummordanta la dentojn en silento, kiam estis parolate pri rusoj, estis la kvara laŭaĝe filieto, nomata „Ziuk“ (zjuk). Liaj grizaj, grandaj okuloj iam tiutempe scitis jetadi fulmojn, kaj la voĉo impulis eĉ pli aĝajn ludkamaradojn al la plej kuraĝaj konceptoj, al malfacilaj kaj kelkfoje doloraj provoj de hardo kaj aŭdaco.

— „Estos Polujo, je nom' de Disinjoro!“ solene sonis el la patrino buŝo la vortoj de poeto, kvazaŭ mirakla promeso, kiel la plej sankta devontigo. Kiun pli forte, ol lin ili kunforĝis por la tuta vivo per pasia ordono, kiu fine akiris povon super la sorto mem?

Guste tial li tiom adoris tiun plej senteman patrinojn, ke ŝi montris al li la krutan vojon al idealo, lumante samtempe per modelo de noblaj virtoj virinaj. Tio, kion li de ŝi ĉerpis, restis al li ĉiama busolo: amo al libereco, bono kaj vero, nefleksebla ambicito kaj kuraĝo.

Kion sentis en la rusa lernejo la knabo, humiligata kaj priridata pro tio, ke li estis polo? spionata ĉie kaj punata pro uzado de l' gepatra lingvo, eĉ se tio okazis en parolado kun kolegoj?... Estis tiaj, kiuj malnobliĝis, aŭ alktimigadis — sed tiu nur hardiĝadis en la spirito, kunpremanante la pugnojn, kun



decido: "Mi vin pripagosi". Pelate al Siberio, li ripetadis en-  
pense siajn promesojn — kaj reveninte, li dediĉis la vivon,  
sen kompromiso, al la afero de unu granda amo, kin ligis sin  
kun ĝranda malamo.

Li suferis nesufiĉecon, laborante ne por propra bonsta-  
to, sed por savi la nacion el la hontego de l' mallibero... Li  
ne posedis helmon, ĉar li devis kaŝadi sin ĉiam aliloke, por  
eviti la ĝendarmojn, ĉiam persekutantajn lin. La sekreta pre-  
sajo de li eldonata semis en la animojn semojn de ribelo, kaj  
li atendis, ĝis kiam ĝi ekreskos. Li atendadis, ŝamigiĝante  
malsanulon en karceroj, sub mortominaco — forkurante alian-  
den kaj ree alvestite kaŝtrante en la fandon... Kun barbo aŭ  
sen, kun okultvitroj aŭ kun nigritaj haroj, kiel „kamarado  
Viktor" aŭ „Mieczysław", riskante li vetludis kun la sorto  
pri la patrujo kaj atendadis... kaj la tempo laboris por lia afero.  
Jaro 1908, 1910 en la aŭstria parto de Polujo. Aŭdiĝas  
flustroj inter laboristoj kaj junularoj: "Ĉu vi scias, estas iu,  
kin violas formi polan militistaron... Ree, kiel iam... Estas, es-  
tosis la „insurrekciolo". Ĉu tio estas ebla? Post 50 jaroj da a-  
pacia konkordigo kun la sorto? La koroj batas, en varmegaj  
kapoj susuro... Estas tia bravulo, seriozeco li elradias, bo-  
necon kaj ian superan veron. Li klariĝas, montras, li mem  
lernas kun ni tiun militon, kin nepre devas veni, li parolas  
pri iamaj braveco pola kaj honoro. Li ne havas alian ekze-  
kutivon, krom rideto kaj brovsulkiĝo, kaj jam post unuaj ek-  
zercoj oni ofertus vivon por li!

Kreskas nova, potenca ideo: sento, pri rajto al armilo;  
multĝas vicoj da homoj sindonemaj al ĝi entuziasme, da di-  
sciplinemaj, pretaj, je ĉio.

Fine batas la deziregata horoj! Antaŭ ol komenciĝis la  
malamikaj pasoj inter Rusujo kaj Aŭstrujo. Pitsudski trans-  
paŝas la limon, komandante siajn paŝistojn. Jen li, en nomo  
de Polujo, proklamas militon kontraŭ Rusujo! Komenciĝas e-  
popeo de braveco, kin provas al la tuta mondo, ke la dispa-  
rtigo de Polujo estis tragedia eraro. Sed germanoj, kvankam  
apartenataj al ligo, ne volas tion agnoski. La komandanto  
krom bataloj, devas konduki baraktadon politikan, ruze kaj  
ne cedeme.

La luktanton en nokto kontraŭ ĝrandego de solecaj  
meditadoroj foje elŝiras el ĝi subite ne kutima sono: krazati  
ies ploro en proksimeco. Li eliras antaŭ sian lokigjejon — estas  
silento ĥodiaŭ flanko de malamika tranĉa limo, nur gardi-

sto, apogita sur karabeno, ploras, ne vidante la aproksimi-  
ĝantan personon. En la komandanto la kortuŝo superas la  
indignecon: ne decas ja, ke la soldato ploru, sed ja jen estas ju-  
na knabeto, kies patrino eble malsana aŭ turmentas lin gran-  
da spirito pri la amatino? "Nu, mi donos al vi forpermesojn!"  
— li pensas — kaj super la kapo de l' soldato aŭdiĝas la  
milda demando: "Kio estas al vi, mia infano?"...

Streĉita en militista pozicio, kontraŭbatalante la kom-  
prenelan hontigon, la teruregita legiano kun malfacilo eligis  
la vortojn. — Ĉar... — li fine balbutis kun jarmoj — la ko-  
mandanto tiel laciĝas, maldormas por ni ĉiuj... Mi ne scias,  
kiel helpi, dio tial..."

Tamen ĝi tie helpis al li, konservis la fidelecon, irante  
kun li en malliberejojn, por ne ĵurpromesi al la invadinto.

La jaro 1918 alportis triumfon, sed samtempe ĉiujn ŝar-  
ĝojn de reĝigo. Sub manoj de Pitsudski rapide kreskas re-  
ĝula armeo, batalas sur kelkaj frontoj, kaj du jarojn poste pro-  
lektas Eŭropon kontraŭ bolŝevisma inundo, per propra bra-  
veco kaj genio de l' komandanto.

Fluas jaroj. Kaj jen, kiel en fajro de l' milito, tiel en  
peno de konstruado, ĝi estas en sia nacio la plej ĝranda kaj  
la plej bona. Tujaj aroj da hierataj ankoraŭ malamikoj ho-  
diaŭ agnoskas en li la plej ĝrandan aŭtoritaton politikan kaj  
moralan.

Depost sep jaroj la Marŝalo loĝas kun familio en var-  
sovia Belvedero, iama palaco de rusaj gubernatoroj. Li ekzi-  
das al laboro ĉirkau la 10-a-horo matene, ofte eĉ tagmanĝon  
prenas en sia oficejo kaj tiel preskaŭ sen paŭzo ĝi prizorgas  
ĝis vespero multajn konferencojn, raportojn, ordonojn. Mal-  
longa ripoztempo kolektas ĉe la familia tablo la ĝeedzan pa-  
tron kun du junaj filinoj.

Simiorino Aleksandra Pitsudska helpadis brave al la e-  
dzo en lia antaŭmilita, revolucia batalo kontraŭ la carismo,  
kaj ĥodiaŭ ŝi estas senlaca socia agantino, precipe eur tere-  
no de FIDAC kaj de junularprolektado.

La propraj infanoj — jen la plej ĝranda persona ĝojo  
en vivo de la Marŝalo ĝrandega, sentema amo metas la pon-  
ton inter la mondo de tiu batalinto kaj ŝtatviro kaj la in-  
tereŝirgondo de la gimnazianoj de V kaj VI klasoj. Ambaŭ  
fratilinejoj, Wanda kaj Jadwiga, estas tre kapablaj kaj emi-  
nente partoprenas en kolegeca vivo de ilia lernejo. Eduka-  
te en demokratraj principoj, ili alkutimiĝis al nenia lukso; la



PROF. DR. ODO BUJWID.

## REMEMORO PRI LA UNUA POLA MARŜALO JÓZEF PIŁSUDSKI.

Krueĵa sorto forrabas el inter ni la plej valoran homan vivon.

La tuta lando, la tuta pola nacio ploras kaj demandas kun senlima doloro: kial tiom grava sortobato, nerevokebla, terura, atingis nun jam nun? Li ja povus ankoraŭ vivi por la prospero de Lia patrujo. Li havis nur 67 jarojn.

Jes! La sorto ne demandas, sed decidas. Grava malsano, kancero, forrabas eĉ pli junajn vivojn. Oni nur miras, ke Marŝalo dum la tuta tempo ne montris eĉ malgrandan signon de suferoj, kiujn li devis sendube senti, havante tiel gravan malsanon, kiu certe daŭris jam pli ol unu jaron. Li senĉese laboradis, vizitis sian ministrejon, disdonis ordonojn, akceptis gravajn politikistojn. Nur en la lasta semajno li jam ne povis akcepti la anoncitan viziton de la franca ministro Laval, ĉar la malsano jam faris tiom grandan neatenditan progreson, ke li jam estis en ekstrema danĝero.

Kiel vi eble scias el miaj antaŭaj rememoraĵoj pri nia kara unua Marŝalo, li naskiĝis en Zułów, propraĵo de la familio Piłsudski.

En Zułów juna Piłsudski ĉerpis el la buŝo de sia amata patrino ĉiujn siajn patriotajn sentojn por la suferanta patrujo, dispartigita de tri potencaj monarĥoj. Li eksciis de ŝi profetatojn de grandaj polaj poetoj, Mickiewicz kaj Slowacki, ke la perfortigita Pollando restariĝos post granda, krueĵa milito, en kiu disfalos la grandaj potencoj.

Profunde enradikigis tiuj profetajtoj en la animon de la juna knabo. Jam kiel fernanto en rusa gimnazio, ĉar polaj gimnazioj ne ekzistis en Pollando, li revadis pri revivigo de pola militistaro. Sed ne estis eble. Kiel studento en Ĥarkov (Ruslando) li jam kunlaboris kun rusa revolucia partio, kaj pro tio li estis malliberigita kaj sendita al Siberio.

Reveninte, li komencis agadi inter pola socialista partio, kiu penadis disvastigi la revolucian, sendependan de rusa revolucia movado, polan socialistan laboristan organizaĵon. Li redaktis kaj persone presadis, helpate de sia edzino, Marja

Dr. Leopold Dreher.

## Lingva esploro.

Iu eminenta esperantisto lastatempe insistis, ke o i povas diri: perdi la fidon en la sincerecon, anst. je la sincero. (Kompreneble, oni povas diri: pri la sincereco, se al iu ne plaĉas la universal-pezopozicio „je“).

Mi tre dubas. Eĉ plie, mi permesas al mi, averti kontraŭ tia tute ne klarigebla misuzado de la akuzativo de direkto, averti kiel eble plej forte!

Tio estus simpla naciismo, venanta de la pola: zaufanie, wiara w coŝ, kogos (pole: en ion, en iun).

Ekzistas en Esperanto kelkaj esprimoj, unuavide nelogikaj, kaj tamen pravigeblaj kaj akcepteblaj (ne: akceptindaj), pro tio, ke ili trovas similitojn en la plej multaj eŭropaj lingvoj. La citita samideano mencias: inversa flanko de medalo. Eble li pravas. Eble efektive ĉiuj aŭ, almenaŭ, la plej multaj eŭropaj lingvoj (la ekstereŭropaj devas, bedaŭrinde, resti sen atento...) komprenas la signifon de tiu ĉi esprimo.

Sed ĉu estas eble, ke malgraŭ ke

Germanoj diras: glauben an, ili trovu ĝusta esperantan: kredi en ion? Kien ni venus, se ni ne mem kontrolus nian lingvuzadon, tiel ke ĝi restu en konsento ne nur kun nia propra lingva sento, sed ankaŭ kun tiu de aliaj naciaĵoj?

Kelkaj esperantistoj — kun la citita eminenta esperantisto — misuzas la pozicion kun gluante ĝin eĉ tie, kie ĝi tute ne taŭgas. Ekz. „kun la banado estas iom malbone“. Kompreneble, devas esti: pri la banado. La pola: z kapaniem nieco niedobrze, ne signifas, bez kapania jest dobre (se n banado estas bone) sed simple: koncerne banadon, pri banado, kvazaŭ ni dirus: la afero de banado estas iom malbona, pole: co się tyczy kapieli (kapania), to sprawa ta nieco szwankuje, rzecz nie całkiem idzie, ma się niedobrze itp.

A contrario: „kun mono estas bone“ ne signifas, ke la valuto staras bone, estas alta k.s. sed simple: sen mono estas malbone, sen mono oni povas fari... ŝuldojn.

Ne forgesu, ke Esperanto proklamas kie! siajn ecojn: simpla, belsona, logika ktp.



la gazeton „Robotnik“, en kiu li tiom akre propagandis revolucian movadon en Polujo, ke la rusa registaro per ĉiuj fortoj kun grandega penado serĉis la lokon, kie oni presis kaj la personon, kiu eldonadis la gazeton. Dum kelkaj jaroj la penado ne sukcesis — fine, tute okaze, la rusaj gendarmoj malkovris la presejon en Łódź kaj kaptis la presiston Piŝudski dum la presado.

Grava krimulo estis jam kondamnita al morto, sed li forkuris, evitante la mortpunon.

Li trovis rifugejon en Kraków, kie li tuj komencis daŭrigi sian agadon, preparante samtempe unuan militiston por proksima milito kontraŭ Ruslando kaj rusa caro.

Li tute profete antaŭvidis, ke la milito devas malsukcesi por ĉiuj tri monarĥioj.

Lau ĉi opinio, devis alveni fino de la mallibero. Polando nun certe liberigosi!

Ne multaj el samnacioj opiniis tiamaniere, kiel Piŝudski. Plejmulto jam alĉutimigis al la mallibereco. Multaj estis jam kontentaj, se Polujo ricevus autononion sub la fremda, rusa aŭ germana, reĝado.

Nur Piŝudski celadis al la jam delonge de si mem konstruita plano. Li ne cedis. Kun polaj legianoj li batalis kune kun aŭstria kaj germana armeoj, ĝis kiam li fine vidis la ruŝojn tute venktajn. La rusa carismo de nun ne pli malhelpos al la reviviĝo de la Patrio. Aŭstra kaj germana imperiestra reĝado ankoraŭ restas. Piŝudski ne deziras plu kunlabori kun ili. Li neniam batalos kontraŭ franca aŭ angla armeoj. Li kaj legianoj ne juras al la aŭstria imperiestro. Li preferas solvi la leĝojn kaj esti malliberigata en Magdeburgo ĝis la fina nenigo de la du restantaj potencoj, germana kaj aŭstria. Tiu momento alvenis. Ne plu ekzistas la tri imperiestroj, kiuj dispartigis Pollandon. Alvenis de longaj tempoj profeta momento, kiam Pollando estis liberigita kaj iĝis sendependa. Piŝudski revenas el Magdeburga malliberejo, estas akklamita ĉiuvode kaj unanime de la tuta popolo — estro de la Pola Respubliko.

Interne Polujo estas dispartigita, malforta. Piŝudski kreas unuan polan parlamenton — seĝmon, kiu elektus prezidanton de Pola respubliko.

Sed restas ankoraŭ miskomprenoj, kiuj daŭras ĝis la j. 1926. La parlamento voĉdonis konstitucion, ne donantan al la prezidanto sufiĉe da fortoj. Piŝudski devas perforte or-

estas koncipitaj nur el spirito de l' popolokanto, konservas ritmon de l' danco, kaj en ĝiaj kadroj formas inspirplenan poezion de propra invento. Do ili estas ĉefverkoj de stilo, ili estas muzikaj poemoj, miniaturoj de subtila formo kaj lirikismo.

Da mazarukoj estas pli ol kvindeko, kaj ĉi alta, ĉi aparta, individualaĵo. Sentoskalo estas senmezure granda; kontrastoj de agordo, ritmo, tempomezuro kaj melodio alŝovas al la aŭskultante malgraŭvole bildajn asociojn. Tial la literaturo svarnas de multaj komentarioj, ilustrantaj agordan enŝaŭvon de l' mazarukoj. Ne ĉiam ili estas trataj; kelkfoje banataj aŭ sentimentalaj. Subtile enpenetris en spiriton de l' mazarukoj pola poeto Kornel Ujeŝki en belaj „Tradukoj de Chopin“.

En la mazarukoj de Chopin kristaliĝis la animo de l' raso: ĉiian revoluci-konspirantan karakteron kaj signiton por la pola nacio en periodo de l' mallibero difinis plej bone Robert Schumann per fama diro, ke ili estas „kanonoj kasitaj en floro“.

Kiel ĉefverkoj de formo la mazarukoj ravas kaj entuziasmigas antaŭ ĉio per senĝala beleco de l' melodio, per majstro de ritmo kaj per riĉo de novaj konceptoj de harmonio. Guste sur tiu kampo faris Chopin gravan revolucion: sen la Chopina harmonio estus ne imagebla „la nova muziko“. Richard Wagner kontesas mem en sia aŭtobiografio „Mein Leben“, kiom li dankas al la mazarukoj rilate al la harmonio. Kurage oni povas aserti, ke sen la mazarukoj de Chopin ne estus „Tristan“ de Wagner.

Per ĉiĉlo de siaj mazarukoj vekis Chopin kultron de pola kanto, de ĝia beleco kaj de ĝia signito. Antaŭe oni ne taksis ĝin sufiĉe, oni eĉ malestimis ĝin: la supro de artismo kaj idealo de l' antaŭ-Chopina muziko estis itala opera ario. Kiam Miĥaĉlo Ĝlinka enkondukis antaŭ cent jaroj en sian naciaan operon „Vivon por caro“ popolmelodiojn, la rusa aristokrataro evitis teatron, ne volante aŭskultiti tiun „muzikon de veturigistoj“.

Fine Chopin vekis estimon kaj respekton al la malestimata popola kanto, malksitis antaŭ la miregigitaj eŭropaj socioj novajn horizontojn, entuziasmigis komponistojn de aliaj nacioj kaj per siaj „mazarukoj“ metis fundamentojn por stilo de l' moderna muziko.



garan. Dume la ludo de mazurkoj postulas ne kutiman facilmovecon, vervon, simplecon, naturecon kaj krome rafinitan, subtilan graciecon kaj... maturecon de artismo.

Multaj pianistoj kuraĝas ludi la Chopin'ajn mazurkojn, subĝante al iluzio, ke ili estas teknike facilaj. Dume nenio estas pli malfacila, ol ĝi ĉi bona plenumo. Decide oni povas aserti, ke el ĉiuj komponaĵoj de Chopin ili estas plej malfacilaj por interpretado.

Tial bona ludanto de mazurkoj apartenas al maloftaĵoj: grandioze ilin ludas Aleksander Michałowski, majstre Ignacy Paderewski, kelkfoje, do ne ĉiam, nur en momentoj de bona spiritaĝardo, bele ilin ludas Ignacy Friedman. Car neniu el la komponaĵoj de Chopin estas tiel dependa de nervovibrado de la ludanto, kiel „Mazurkoj“.

